nia voĉo

madrida esperanto-liceo julio/aŭgusto 2025

## TEMPO POR ĜUI INTERNACIAJN RENKONTIĜOJN TUTMONDE

Julio kaj aŭgusto fariĝos denove la plej adekvata momento por ĝui esperantistajn renkontiĝojn diverslande. Ni plu invitas vin esplori la retejon *EventaServo.org*, kie troviĝas kunvokoj por renkontoj el ĉiuj niveloj.

Unue ni menciu la Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazos en la ĉeĥa urbo Brno (Burno) inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto. Aliĝis jam pli ol 1000 esperantistoj, inter kiuj trideko el Hispanio. Vi povas koni pliajn detalojn en: https://uk.esperanto.net/2025/. Cetere, UEA ĵus informis ke la kongreso de la jaro 2026 okazos en la aŭstria urbo Graz.

La 81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos en Cisarua (Indonezio) de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2025. Ĝi eble estos la plej diversa renkontiĝo de la jaro, kun ĉeestontoj el tre diversaj landoj, danke interalie al la helpo havigita de la fonduso "Partoprenu IJK-n", kiu alvokis al donacado por ebligi la amasan partoprenon de aziaj kaj oceaniaj junuloj en la evento. Ĉiujn detalojn pri la Junulara Renkonto, trovu ĉe: https://ijk2025.tejo.org/.

La Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazos en Beogrado (Serbio) inter la 19-a kaj 26-a de julio. Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazigos sian kongreson ĉijaran en la kastelo Greziljono de Francio, inter la 9-a kaj 16-a de aŭgusto.

Krome, okazos multaj aliaj renkontoj, je internacia, landa kaj loka niveloj, kaj eĉ rete, kaze ke vi ne havos tempon, monon aŭ emon viziti la plej amasajn. Por trovi la plej adekvatajn por vi, ne forgesu viziti EventaServo.org.

## INTERVJUO POR PODKASTO

Pedro Hernández estis intervjuita pri Esperanto en la podkasto *"Ayer soñé"* (Hieraŭ mi songĝis), kreita de la ĵurnalisto Marta Gómez. Vi povas spekti la rezulton en jena adreso: https://www.youtube.com/watch?v=tMdKKSQ9hIc



## PREZENTADO DE LIBRO KUN ESPERANTAJ POEMOJ

La 27-an de junio, Jorge Camacho prezentis en la librovendejo Alberti, de Madrido, sian poemaron "Remolinos y remansos", plejparte hispanlingvan sed kun poemoj en Esperanto. Vidu momenton de la prezento, kiun ĉeestis dudeko da interesiĝantoj, en la apuda foto.




## LEGU LIBROJN EN ESPERANTO DUMSOMERE

Krom la ĵus menciita poemaro, ni kuraĝas inviti vin aĉeti kaj legi esperantajn librojn dum la somero, laŭteorie la plej adekvata sezono de la jaro.

En la lastaj monatoj estis eldonitaj pluraj libroj, kiujn vi povas akiri pere de la libroservoj de Hispana Esperanto-Federacio aŭ de la asocio SAT-en-Hispanio, aŭ rekte en la MEL-sidejo. Ni invitas vin konsulti la paĝon www.esperanto.es/novedades-editoriales-en-esperanto-presentadas-en-soria/, kie oni mencias kelkajn ĵus eldonitajn librojn, prezentitajn en la kongreso de Sorio. Aŭ vizitu https://www.esperanto.es/venta-de-libros/ por koni pliajn eblecojn. Bonan legadon!

## PROGRAMATAJ RENKONTIĜOJ

La unuasabata kunveno okazos la 5-an de julio, kiel kutime je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia). Memoru ke ĝi estas malferma al iu ajn, sendepende de la lingva nivelo kaj ke la babilado estas libera, sen programo. Ni ankoraŭ ne programis renkontiĝon por aŭgusto, kaj ĉio dependos de la nombro da homoj restantaj en Madrido. Do, bv esti atenta al la kutimaj komunikkanaloj por konfirmi tiun eblon (vidu sube).

Oni ankaŭ ne certas pri la kalendaro de renkontiĝoj en la sidejo dum la someraj tagoj. Principe oni malfermos lunde ekde la 6,30 vespere, sed bv. anonci vin se vi planas ĉeesti.

Estu ankaŭ atentaj al ebla alveno de ekstermadridaj esperantistoj dum venontaj feriaj semajnoj. Kaj se vi ekscias pri ies alveno, ne hezitu anonci tion por eble komuna renkontiĝo.

## PLIAJ LOKOJ POR INFORMIĜI

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero vi povas trovi nin ĉe: https://x.com/LiceoMadrida. Kaj memoru ke MEL malfermis profilon ankaŭ en la socia reto *Bluesky*, en la adreso: https://madridaliceo.bsky.social.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

## FELIĈAN SOMERON AL ĈIUJ!

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com